

# Saluton!


Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 5

Majo, 2016

*Sinceran "Saluton!" al ĉiuj niaj estimataj legantoj. Ankoraŭ unu monato elvaporigis, sed nia bulteno ekzistas malgraŭ ĉiuj veter-bariloj. Do, ek! Kvankam la aprila kunsido estis planita omaĝe al verkoj de la fama moskva bardo V. Visockij, sed samtempe en la eksa Sovetio oni memorigis viktimojn de la Ĉornobila katastrofo, kiu okazis ĝuste antaŭ 30 jaroj – la 26an de Aprilo 1986. La preleginto Araneo strebis kombini du eventojn.*

*Alproksimiĝas nia tradicia E-pikniko kaj la 101-a UK en Nitro, al kiu jam aliĝis pli ol 1100 gesamideanoj. Bonvolu sendi viajn informojn pri la du mencitaj eventoj. Dankon! Kaj ĝis la! –La Redaktoro*



*E-renkonto kun unu la plej famaj bardoj de la eksa Sovetio, fakte, fondinto de la barda movado en tiu forgesinda lando, estis planita delonge en nia E-societo. Sed okazis tiel, ke la fakta prelego koincidis kun la 30-jara datreveno de la plej terura tragedio de la Homaro – Ĉornobila katastrofo. Pro tiu koincido nia preleginto Araneo strebis fari la jenon:*

## Vlad Visockij (1938-1980)

*Moskva poeto, muzikisto, bardo, aktoro. Kiel aŭtoro kaj kantisto kun sia gitara akompano li havis vastan popularecon en la 70-j jaroj de la 20-a jarcento, kvankam lia nomo estis malofte menciata en tiamaj amaskomunikiloj de USSR. Fakte, li estas idolo de multaj sovetianoj, silente ne subtenantaj komunisman reĝimon. Renoma angla-rusa tradukisto Alekso Babiĉ estis petata esprimi siajn memorojn pri V. Visockij*

“Mi, kiel multaj homoj de mia generacio (nun mi estas 65-jara), +/- 10-15 jaroj, kiu vivis en la Sovetio, kreskis kun la kantoj de Visockij, de lernejoj kaj studentaj jaroj kaj ĝis hodiaŭ nek ununura ĉetabla evento, neniun renkontiĝo ĉirkaŭ la fajro en turisma tendaro ne okazis sen multhora ĥora kantado de Visockij-kantoj. Kaj ĉiuj ĉiam scias la vortojn. Kial?

Fakte: ne estis, forestas kaj, eble, ne estos pli populara kaj tutpopola ŝatata de niaj 1-2 generacioj aŭtoro-kantisto-aktoro sur la postsovetia teritorio, proksima kaj malproksima ekstereco de Moskovo (Visockij verkis ruse, kantis ruse, sed francoj, sen traduko, senspire, aŭskultis lin en Parizo... jen estas magio...) – Ukrainio, Blankrusio, Israelo, Usono, Kanado ktp, ekrigardinta en animojn de milit-veterano, fizikisto, malliberulo, long-distanca ŝoforo, sportisto kaj aktoro – estas sence listigi, ĉar li turnis sin al ĉiuj kaj ĉiam – trafe. Elmigrintoj kunportis kun si

liajn kantojn, aranĝas festojn, kolektiĝadas dum lia mortotago, kiel en Ŝikago, ĉe Visockij-ŝtono sur la bordo de Miŝigana lago en Evanstono (sur la foto).

Okazis nek unu evento en 60-70-aj jaroj, je kiu li ne respondis; kaj, en sia unika maniero, en sia propra stilo, kaj la kantado estis lia sola voĉ-tembro, ne kompatante la ligojn, aortan rompon... Kompreneble, la

potenco de lia poezia talento estis taksata poste.

La 25an de Julio, 1980, estinte tiam en Kijivo, veninte hejmen de laborejo, mi eksciis pri la morto de Visockij. Mia reago estis surprizo eĉ por mi: la gorĝo ekbuliĝis... mi metis sur la pianon 2 kovrilojn de liaj diskoj – portreto kun

gitaro kaj foto kun griza kaskedo kaj mantelo – kiel la junuloj de nia kvartalo – tiel nia... Mi verŝis al mi glason da vodko, trinkis kaj ploris, la unuan fojon en mia vivo... Mi priploris perdon de la proksimulo, kiu tiom multe rakontis al mi kaj ekkantis. Sed, kiel li mem diris, li ne sukcesis finkanti multon.”



Tio faras strangan rezulton. Britio povas esti polusiĝanta, nekutima EU-membro, sed la angla iĝis neŭtrala, utila pro tio, ĉar aliaj komprenas ĝin. Ĝia ligo kun Britio jam malfortiĝis. Revuloj longe esperis pri neŭtrala helplingvo, kiu estus komuna al ĉiuj. Iuj eĉ prenis al si taskon de inventado de tiaj lingvoj. Kiu scias? La angla povus iam plenumi la rolon destinitan por Esperanto.

–Aleksa Babiĉ, Ŝikago, tradukisto

«Ni havas tempon,  
vizito al Dio ne estas malfruoj.  
Sinjoro frue alvoko de la plej bona ...»

*V. Visockij mortis dum la Olimpikaj Ludoj en Moskvo, en 1980. En tiu sen-Interreta tempo erstis malfacile rapide informi homamason pri iu evento. En Moskva Teatro-sur-Taganko oni metis mallongan informon "Forpasis Vlad Visockij". Sed la paperinformo ekis milojn da homoj partopreni entombigon: homoj staras sur la tegmentoj de multaj konstruaĵoj. Lia edzino, fama franca aktorino Marina Vladi diris: "Mi spektis entombigon de princoj, de reĝoj, sed mi neniam vidis ion similan".*

*Kantoj de Visockij estis tradukitaj en pli ol 160 lingvoj. Hodiaŭ ni prezentas al vi tradukon de lia kanto, kvankam Vlad antaŭvidis katastrofon en Ĉornobilo. Jen...*

## Kanto pri la Tero

Kiu diris, ke mortis la Ter'?  
Ne, ĝi nur eksilentis portempe.

Nia ter' ĉiam restos patrin' –  
kiel maron elĉerpi ne eblas.  
Ĝi ne mortis en cindra ruin',  
nia ter' pro la plago funebras.

Vunde faŭkas obusa krater',  
kaj tranĉeoj al tranĉoj identas.  
Foraŭdiĝis la nervoj de l' Ter',  
kaj neteran suferon ĝi sentas.

Por murdistoj – jen nia edif':  
resti kripla la Ter' ne konsentos!  
Kiu diris: "Finiĝis la viv',  
kaj eterne la Tero silentos"?

Ne, tra ĝemoj sonoras al ni  
nia Ter' el la vundoj sen limo.  
Ja la Ter' estas nia anim',  
kaj per bot' ne treteblas animo.

Kiu diris, ke mortis la Ter'?  
Ne! Ĝi nur eksilentis portempe.

–Tradukis Nikolaj Lozgaĉov  
–Finpreparis Araneo

## Zamenhof-Centro en Bjalistoko

La Zamenhof-centro en Bjalistoko estos malfondita kiel sendependa kultura institucio por ŝpari monon. Ĉiuj laborantoj estos maldungitaj. En diskuto pri la temo loka politikisto komparis Zamenhof kun Hitlero.

La Zamenhof-centro en Bjalistoko estis malfermita okaze de la Universala Kongreso en la urbo en 2009, kaj komence funkciis kiel sekcio de la Bjalistoka kulturcentro. Ekde januaro 2011 ĝi iĝis memstara kultura institucio, laŭ propono de la partio Civitana Platformo (Platforma Obywatelska, PO).

Nun la urba konsilio konkludis, ke por ŝpari monon necesas ekde la venonta jarŝanĝo malfondi la Zamenhof-centron kiel sendependan institucion. Lige kun tio, la laborantoj estos maldungitaj, sed eventuale kelkaj el ili estos poste redungitaj kadre de la kunigita Bjalistoka Kulturcentro, en kies strukturon la Zamenhof-centro eniros.



### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Randy Ream  
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707  
773-262-7738  
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Randy Ream  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Tina Seastrom  
Kasisto – Karlo Gunn  
Membro – Hans Becklin

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon!  
Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**24an de Majo** – Gvidos Randio

**26an de Junio** – Tradicia E-pikniko

**26an de Julio** – Temo estos anoncata

**23an de Aŭgusto** – La 101-a UK en Nitro

